



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2024 (231)

31. 10. 2024

La klubo translokiĝis



Foto: E-mental'

Post longaj jaroj la Esperantista klubo en Prago devis translokiĝi al alia adreso, ĉar la posedanto de la klubejo havas aliajn planojn por la spaco. Lunde la 24-an de junio 2024 renkontiĝis 8 volontuloj, kiuj malplenigis la ŝrankojn en la malnova klubejo, pakis ĉion en kestojn kaj sakojn, transportis ilin al la nova klubejo kaj reordigis ĉion en la ŝrankojn en la nova klubejo.

(Legu pli en la paĝoj 3 kaj 4.)

EL LA ENHAVO

Nová klubovna	3
E. Kovtoniuk ekspoziciis fotojn	4
Prezidento Pavel ĉe Esperantaj-brikoj	9
Forpasis Stanislav Krajíček	10
Grazanoj en Prago	12
Franz Kafka – fama kontraŭ sia volo	14
Maria Terezia-ordeno	19

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brachacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

AKTUALAĴOJ

Okazintaĵoj

20/06/2024 – prelego de Margit Turková nomita „Marjorie Boulton humore“ (*lasta aranĝo en la kunvenejo Ve Smečkách*)

24/06/2024 – translokiĝo el la klubejo Ve Smečkách al la nova klubejo en Revoluční 5 – volontuloj translokiĝis klubajn havaĵojn

13/07/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 5 en Šumperk

31/07/2024 – tradicia E-mentala aranĝo Helpu helpi

31/08/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 6 en Svitavy

12/09/2024 – prelego de Eŭheno Kovtoniuk pri UK-o en Aruŝa kaj ekspozicio de liaj fotoj (*unua kunveno en la nova kunvenejo en la strato Revoluční*)

21/09/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 7 en Benešov

26/09/2024 – prelego de Jiří Tomeček kaj Miroslava Tomečková pri UK-o en Aruŝa (*kunvenejo*)

05/10/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 8 en Přerov

10/10/2024 – solena rememorigo de la forpasinta Stanislav Krajíček / prelego de Tomáš Břicháček pri klimata terminologio (*kunvenejo*)

24/10/2024 – prelego de Petr Chrdle kaj Josef Kalčík pri la informado pri Esperanto (*kunvenejo*)

Novaj prelegoj en nia jutuba kanalo

Margit Turková: *Marjorie Boulton humure*

<https://www.youtube.com/watch?v=mCsGJiq2Qa4&t=749s>

Tomáš Břicháček: *Klimata terminologio*

https://www.youtube.com/watch?v=Vmxiv_DPLPI&t=200s

Ni rekomendas ankaŭ la prelegon de Petr Chrdle „*(Mal)konvena*“ *informado pri Esperanto* en la kanalo Esperanto Australia:

<https://www.youtube.com/watch?v=7ZfB2XSxlwI>

Nová klubovna

Od září 2024 se pražský klub schází v prostorné klubovně v Revoluční ulici č. 5 v budově někdejší pojišťovny Viktoria.

Klub toto místo již v minulosti poznal. V kronice Jiřího Patery se můžeme dočíst záznam z roku 2001: „2001/03/19 jarkunveno de EKP okazis en ejo en Revoluční strato. Estis reelektita la malnova komitato. La ejo en Revoluční estis bela kaj vasta, en la centro de la urbo. Sed estis tie granda strat-bruo, tial ekde septembro la klubo kunvenis en alia kunvenejo, en str. Ve Smečkách n-ro 25.“ Také v rozhovoru s Josefem Trojanem v Bultenu 3/2014 se dočteme: „La tempo pasis kaj la klubo transloĝiĝis multfoje. Ni estis en la strato Revoluční, en Smíchov, en Malnova Urbo... Ve Smečkách oni ankris en la naŭdekaj jaroj.“

K přestěhování klubových věcí došlo ještě před prázdninami, 24. června. První schůzka se pak uskutečnila 12. září, kdy zde přednášel a vystavoval fotografie Jevhen Kovtonjuk.

* * *

V památkovém katalogu Národního památkového ústavu se můžeme o budově, kde se klubovna nachází, dočíst následující:



Anotace: Sedmipatrový dům v novoklasicistním stylu byl postaven podle projektu pražského německého architekta Fritze Lehmana v letech 1936-37.

Dům v řadě Revoluční třídy byl vystavěn na místě čtyřkřídlého objektu z 19. století. Plány novostavby vypracoval pražský německý

architekt F. Lehmann v roce 1936 pro všeobecnou pojišťovací společnost Viktoria v Berlíně. Vystavěla ji v roce 1937 firma Pittel & Brausewetter. Ušlechtilé ztvárněný dům zapadá do kontextu novoklasicistických tendencí v pražské architektuře 2. poloviny 30. let 20. století. Dům prošel úpravami v letech 1954, 1980–81, 1990. Nad kompaktním blokem suterénu a dvou spodních podlaží se zvedají tři třítraktová křídla na půdorysu písmene H. Dům má železobetonovou skeletovou konstrukci, ploché střechy. Fasáda do Revoluční třídy o sedmi okenních osách je sedmipatrová: 1. patro je zevně skryto v obloucích obchodních portálů a 7. patro ustupuje. Kamenný

povrch průčelí člení v přízemí a v 1. patře, oblouky výkladců, kulatá okénka mezi nimi, edikuly vchodu do obchodu s kamennými markýzami, ve vyšších patrech pak jednoduchá dvoudílná okna a třídílná francouzská okna se zábradlím nad římsou dělicí 5. a 6. patro. Vstup do pasáže ve druhém oblouku přízemí je v kompozici fasády vyznačen změnou rytmu a formátu oken 2. patra nad pasáží. Z osmiosé fasády do Benediktské ulice sestupující terasovitě k severu, vystupuje vpravo velký arkýř v šíři šesti os: okna 1. a 2. patra jsou tu spojena do dvojic velkými rámy. Hala pasáže při Revoluční třídě obsahuje dvě otevřená schodiště k terase 1. patra. Zachovaly se v ní původní kovové výkladce a reklamní skříňky. Také v domovní hale zachovány původní detaily včetně desky se schránkami.

<https://pamatkovykatalog.cz>

Eŭheno Kovtoniuk prelegis kaj ekspoziciis fotojn

La 12-an de septembro, kiam ni unuafoje kunvenis en la nova klubejo en la strato Revoluční, ni havis tre interesan programon. Eŭheno Kovtoniuk parolis pri siaj travivaĵoj el la Universala kongreso en Aruŝo kaj ekspoziciis siajn fotojn.

Eŭheno estas mondfama talenta fotisto ofte vojaĝanta tra la mondo havante diverstemajn personajn fotoekspoziciojn en diversaj urboj kaj landoj – ekzemple en Nov-Jorko, Londono, Ĝenevo k. a. Krom tio li estas meritulo de ukraina Esperanto-movado.

Ni tre ĝojis, ke li iĝis nova membro de nia klubo.



Eŭheno Kovtoniuk parolas en nia klubo

Selektitaj fotoj de Eŭheno



Kilimanĝaro



Afrikanaj belulinoj





Transdono de la kongresa flago



Afrikaj infanoj

Duonjubleo de Margit Turková

Pavla Dvořáková



Fine de septembro nia samideanino Margit Turková festis belan duonjubleon. Ni deziras al ŝi firman sanon kaj multe da elano.

Margit TURKOVÁ (fraŭlinnome Kvietková) naskiĝis la 26-an de septembro 1939 en Čierny Balog en Slovakio, de kie ŝi post la milito transloĝiĝis al Bohemio al la nuna distrikto Tachov. Tutvive ŝi laboris kiel inĝenierino-agronomino. Ŝi esperantiĝis en 1969 kaj ekmembris en ĈEA en 1971. Ŝi agis en EK Bor u Tachova kaj ekde 1979 en EK Příbram. En 1976–1982 ŝi estis ĈEA-komitatano kaj zorgis interalie pri ĉeĥo-slovakaj eldonoj de la gazeto Paco. En 2011 ŝi fariĝis honora membro de ĈEA.

Ŝia agado estas orientita precipe al la literatura sfero. Ŝi kunverkis, enkomputiligis kaj helpis eldoni la lastajn verkojn de Čestmír Vidman kaj kuntradukis lian libron *Laskavá fantazie – Karesa fantazio* (2010). Antaŭe ŝi kunlaboris ankaŭ kun J. Karen, J. Rumler, E. Seemannová, rusa poetino L. Vondroušková kaj nuntempe kun V. Ludíková. Kun Marie Ribasová ŝi verkis kaj mem eldonis *Gastronomian vortaron ĉeĥan-Esperantan* (2015). Ŝi kontribudas al Starto, Informilo de AEH, Praga Bulteno kaj ankaŭ al La Gazeto de OSIEK, kies konferencojn ŝi partoprenis kaj kontribuis ankaŭ al ilia programo. En la konferenco de la Unio de tradukistoj kaj interpretistoj en 2011 ŝi prelegis pri tradukoj de J. Hašek en Esperanton. En 2017 KAVA-PECH eldonis ŝiajn tradukojn de *Francisko Valdomiro Lorenz* de Vlastimil Novobilský kaj *Spirita revolucio en la koro de Eŭropo* de Přemysl Pitter.



Saluto por Margit Turková el la klubejo, la 26-an de septembro 2024

Prezidento Pavel ĉe Esperantaj-brikoj



Ĉi-jare kiel kutime okazis la E-mentala aranĝo HELPU HELPI, dum kiu ementalanoj aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas al handikapuloj. Estis kolektita mono por 40 brikoj. La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj. Bonŝance ekestis foto kun la ĉeĥa prezidento Petr Pavel, kiu ankaŭ partoprenis la projekton Briko. En la foto klare videblas la Esperantaj brikoj.

AKCE C HLA

Forpasis Stanislav Krajíček

Pavla Dvořáková



La 29-an de septembro 2024 subite kaj neatendite forpasis en aĝo de 68 jaroj praga pentristo kaj esperantisto Stanislav Krajíček. En Esperantujo li konatas sub la arta alinomo PANO (ĉar lia familia nomo signifas en la ĉeĥa lingvo „pantranĉaĵeto“). Li estas aŭtoro de ĉirkaŭ 1200 verkoj kaj sendube apartenas al rimarkindaj vidartistoj, meritanta diskonigon de sia verkaro. Li rememorindas ne nur

kiel kreema, sed precipe bonkora, amikema kaj afabla homo.

Li naskiĝis la 29-an de julio 1956 en orienta Moravio en la komunumo Klečůvka (regiono Zlín). Li kreskis en granda familio kun 7 gefratoj.

En la 1980-aj jaroj li eklernis Esperanton en la klubo en Zlín. En 1990 li transloĝiĝis al la ĉefurbo Prago, kie li pasigis la reston de sia vivo.

Inklinon kaj talenton por arto kaj pentrado li havis jam ekde infanaĝo. Pro praktikaj kialoj li origine lernis profesion farbisto-lakisto.

En 1992 li ekstudis desegnadon ĉe la akademia pentristo Zdeněk Šorf. Sekve tutvive li plu memstudis kaj kleriĝadis pri arto kaj pentroartaj teknikoj kaj memstare evoluigis sian originalan stilon, kiu havis en diversaj vivperiodoj diferencajn aspektojn. La artan verkadon instigis precipe lia laboro de kulisopentristo en la Filma Artakademio (ekde 1995).

Liaj bildoj kaj reliefoj eliras ne nur el lia subjektiva perceptado, sed ankaŭ el tradicia ĉeĥa pentroarto kun akcento pri la aktuala realo.

Li havis viglan fantazion kaj malfermitecon por eksperimentado pri koloroj kaj pri uzataj materialoj (latekso, akrilo, oleo, ligno aŭ tekstilo). Plejparto de liaj teknikoj estas originala kaj mem elpensita.

En pluraj siaj verkoj li esprimis sian intereson pri mitoj, misteroj kaj spiritaj aspektoj de la vivo.

Stanislav Krajíček estis prezentita dum diversaj komunaj artekspozicioj, precipe en Prago, Centra Bohemio kaj Regiono Zlín, kaj havis tridekon da memstaraj ekspozicioj ne nur en Prago, sed ankaŭ en la muzeoj Beroun kaj Rožtoky, en Veltrusy, Zlín kaj aliaj urboj de Ĉeĥio, resume entute en 60 diversaj lokoj.

Lia artkatalogo entenas 977 verkojn, krom tio li kreis ĉ. 300 pliajn.

Temas precipe pri desegnaĵoj kaj pentraĵoj, sed ankaŭ pri plastikaĵoj, reliefoj kaj betlehemoj. Liaj verkoj troveblas en privataj kolektoj en la tuta

Ĉeĥa respubliko kaj precipe dank al Esperanto en multaj eŭropaj landoj, sed ankaŭ en Urba galerio Beroun kaj en Valaĥia sendependa nacia galerio. En Esperantujo en 1998 li estis unu el la kunfondintoj kaj aktivaj membroj en la praga klubo E-mental', kiu apartenas sendube al la plej agemaj eĉ internaciskale. Li partoprenis ofte la klubajn aranĝojn kaj ekskursojn (ne nur enlande, sed i.a. en Slovakio kaj Italio).

En la Esperanto-Muzeo en Svitavy en decembro 2011 li prelegis pri sia persona pilgrimado al Santiago-de-Kompostelo kaj en 2013/2014 prezentis tie siajn verkojn dum la ekspozicio Esperanto kaj muzoj.

En 2014 li grave meritis pri renovigo de la Esperanto-monumento antaŭ la Kongresa Centro en Prago (la okazloko de la 81-a UKo en 1996).

Dum la menciita kongreso li ankaŭ ekspoziciis siajn pentraĵojn. Sekve de tio okazis dank al kunlaboro kun esperantistoj el la klubo Bona Stelo ankaŭ lia ekspozicio en Francio (Romans sur Isere apud Liono).

Stanislav Krajíček havis Esperantan familion. Lia edzino Květa Krajíčková (fraŭlinnome Hubnová) en la 1990-aj jaroj estis prezidantino de Esperantista Klubo en Prago kaj agis en la estraro de ĈEA. La filino Zuzana ankaŭ parolas Esperanton.

Stanislav (nomata Stáník) estis tre ŝatata de siaj geamikoj, li estis ekvilibra, afabla, bonhumora kaj kun fajna humursenso, helpema kaj komprenema, malgraŭ siaj artaj atingoj modesta homo. Li neniam ĉesis lerni kaj serĉi novajn vojojn, ne nur pri la arto. En siaj verkoj li disradiis amon al la vivo, emon al harmonio en la interhomaj rilatoj, esperon kaj kredon pri la bono en la homo kaj pri la pli supera senco de niaj vivoj.

Lia neatendita kaj tro frua forpaso estas granda perdo kaj por liaj proksimuloj kaj geamikoj, kaj por Esperantujo kaj Esperanta kulturo.

La lasta adiaŭo kun Stanislav Krajíček okazis marde la 8-an de oktobro 2024 je 12:50 en la Nova ceremoniasalono en la tombejo Olšany en Prago 3. La klubo E-mental' kaj ĈEA-membroj kaj estraranoj prizorgis esperantlingvan florornamon.



Grazanoj en Prago

Vlasta Piščíková

Vendrede la 6-an de septembro 2024 venis al Prago 5 esperantistoj el Graz, por ke ili travivu semajnfino kun esperantistoj el la klubo E-mental'. E-mentalanoj vizitis ilin jam printempe ĉi jare kaj do ili kompreneble ankaŭ invitis la grazanojn al Prago.

La grazanoj venis al Prago per pli frua trajno, ol ili anoncis, do komence ŝajnis, ke estos fuŝita planita bonvenigo. Sed la bonvenigo estis replanita kaj grazanoj estis bonvenigitaj en stacidomo du horojn post ilia alveturo. E-mentalanoj venis tra ĉefa halo de la stacidomo kun flagoj kaj veninte al la Grazanoj, kiuj atendis sur interkonsentita loko, E-mentalanoj kantis bonvenigan kanton.

Laŭ ĉeĥa kutimo oni proponis al la grazanoj panon kun salo. Poste jam ĉikaŭbrakumoj kaj kisoj. Kaj kompreneble ankaŭ tostado kun ŝaumvino.

De la stacidomo ĉiuj kune iris al klubejo de Praga klubo, kie estis preparita modesta vespermanĝo, post kiu estis programo kreita de E-mentalanoj – prelegetoj, ludo, muzikado, kantado...

Post la programo foriris gastoj al loĝejoj de kelkaj klubanoj, kiuj proponis por ili tranoktadon.

Matene jam je la sepa horo kunvenis la gastoj kaj kelkaj E-mentalanoj en centro de la urbo por kune promeni tra pragaj stratoj, kiuj matene ankoraŭ ne estas plenaj de turistoj. En Malnovurba placo estis mallonga paŭzo por formanĝi hejman kukon kun iom da kafo.

Poste promeno al Karola Ponto, kiu estis bele lumigita de matena suno.

Post la matena promeno la grupeto veturis al Vyšehrad, kie estis je la naŭa kunveno kun pluaj klubanoj.

Post fotado ĉe Esperanto-ŝtono ĉiuj iris al kastelo Vyšehrad por vidi gravajn lokojn de ĉeĥa historio.

Trarigardinte la ĉirkaŭaĵon de la kastelo ĉiuj malsupreniris al ĉerivera urboparto, kie estis en restoracio V Podskalí menditaj lokoj por tagmanĝi.

Neatendite rapidaj servoj en la restoracio permesis mallongan viziton de proksima kafejo AdAstra.

Post la ripozo ĉe kafo ĉiuj denove ekis al la urbocentro por vidi muron kun karitataj brikoj, kie antaŭnelonge kontribuis ankaŭ E-mentalanoj.

De la muro oni promenis tra stratoj ĉe Malnovurba placo kaj Juda urbo.

Poste jam ĉiujn atendis vespermanĝo en restoracio U Skřetů, kie oni povas mendi manĝaĵojn de menuo en Esperanto.

Post iom da postvespermanĝa ripozo ĉiuj ekis al ludejo por ludi bowling. Kaj tio estis lasta programero de la tago.

Dimanĉe matene oni kunvenis proksime de Praga kastelo. Sidante en parko kaj aŭskultante pri historio de Prago ĉiuj lunĉis kukon kun kafo.

Ĉiuj poste ĝuis trarigardon de preskaŭ senhomaj stratoj de Nový svět.

De la trankvilaj stratoj oni transiris al Praga kastelo, kie jam estis pli vigle.

Poste jam tagmanĝo en la restoracio, kiu estas fama pro la plej bona rostita porka genuo en Prago. La tagmanĝo estis planita kiel lasta programero de la vizito de grazanoj, sed evidentiĝis, ke ili ne havas biletojn por la trajno, kiun ili antaŭe anoncis, sed je du horoj malpli frue. Do estis decidite viziti ankoraŭ Monaĥejon Břevnov, kie oni promenis en monaĥeja ĝardeno kaj poste oni gustumis lokan monaĥejan bieron.

Poste jam venis tempo por iri al stacidomo, lastaj ĉirkaŭbrakumoj, lastaj kisoj, lastaj mansalutoj. Espereble grazanoj denove venos!

Esperanto en la Eŭropa tago de lingvoj

La 26-an de septembro 2024 kadre de la Eŭropa Tago de Lingvoj okazis en Prago kaj Brno du aranĝoj kun partopreno de esperantistoj.

La ĈEA-reprezentantoj reprezentis Esperanton ĉe la tiel nomata Speaking. Ĵaŭde la 26an Karola Universitato invitis reprezentantojn de preskaŭ 30 eŭropaj lingvoj al la Kampuso en la strato Hybernská. Ĉiu havis sian propran tablon, kie interesatoj el la publiko povis sidi por kvin minutoj kaj provis simplajn frazojn en la koncerna lingvo.

La starto je la tria horo estis iomete malrapida, sed ekde la kvara horo la nombro de interesiĝantoj signife kreskis kaj pluraj atendis en mallonga vico por Esperanto. Post enkonduka prezento en Esperanto kaj kelkaj demandoj estis loko por demandoj. Verŝajne la plej ofta estis: „Kie oni povas paroli ĝin?“, do estis menciitaj diversaj esperantistaj aranĝoj kaj precipe Universala Kongreso de Esperanto en Brno venontjare. Gvidilo pri Brno en Esperanto kaj Esperanto-broŝuro en via poŝto estas libere disponeblaj por interesatoj.

En Brno membroj de la Brno-klubo prezentiĝis al Esperanto-interesatojn jam lunde la 23-an de septembro ĉe Moravské náměstí (Moravia placo).

<https://www.esperanto.cz>

LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

Franz Kafka – fama kontraŭ (malgraŭ) sia volo

Margit Turková

„Fama“: pro siaj verkoj kaj sia vivo...

„Malgraŭ sia volo“: literatura historio estas dankema al Max Brod (la plej proksima amiko de F. K.), ke li ne plenumis la lastan volon de sia amiko: bruligi ĉiun postlasitan skribmaterialon de li...

Kafka estas fama en la tuta mondo, kaj ni – liaj „sampraganoj“ kaj „samcivitanoj“ skribas jenan memoron en la jubilea 100-jariĝo post lia morto: la 3a de junio 1924.

Pri Franz Kafka estis skribita amaso da skribaĵoj en la celo lin kompreni. Nia artikolo ne estas ia analizo de liaj verkoj (laŭvere ĝuste tia literatura flanko estas la plej interesa). Ni volas ekkompreni lin almenaŭ iom, kiel la homon „el karno kaj ostoj“; kvankam laŭvere dirite, li aspektis kaj vivis kiel la estaĵo etera.

Okaze de la ĉi-jara rememoro estis eldonita libro „Kun Franz Kafka vojaĝe“ (de la aŭtoroj: Judita Matyášová-teksto/Jan Jindra-fotoj). El ĝi ni ekscias, ke Kafka „ĝis-vojaĝis“ (pli trafe finvojaĝis, finpilgrimis) en sia reala vivo, en la dr.Hoffmann-sanatorio en Kierling, proksime de Vieno (Aŭstrio).

La aŭtoroj trovis 67 lokojn, kie F. K. estadis. Ne, ni ne mencias ĉiujn, kelkaj troviĝas eksterlande. Sed multaj estas tute proksime – do rekte en Prago. Nur en sia naskiĝurbo estadis F. K. sur 21 lokoj! Sed ne pro tio, ke li estus ia „praga pilgrimanto“ (kiel V. Nezval), kiu volus profunde trarigardi jenan urbon, kies magio estis konata eĉ malantaŭ la limoj de nia lando; ĝi allogis precipe la verkistojn germanajn. Kelkajn el ili konis F. K. persone, kaj ties verkaĵoj estis tage –vespere traktataj en diversaj kafejoj – menciendas la plej fama ARCO – kie Kafka „kafumis“ kun siaj amikoj.

Kial li tiom „migradis“ en la urbo? La unusola kialo estis serĉado de la loko, kie li havus je dispono plenan trankvilon, kie li povus senrompe verki. Post longa tuttaga okupiĝo en laboro (10–12 horoj) kaj post la vespera renkontiĝo kun amikoj li havis nur unusolan deziron („celo de lia vivo“) – en kvieto sidi ĉe tablo kaj skribi. Meti sur la paperon ĉiujn ideojn kaj emociojn, kiuj amasiĝis en lia animo.

Jen ni demandu: ĉu tian lokon li trovis en Prago? Ni scias, ke ne...

Nian artikolon ni direktos iom „patriotece“ ...

Ne, ke Kafka mem ian patriotecon sentis... nek ĉeĥan, nek germanan... estis li nek ĉeĥo nek germano; li estis judo... La juda kulturo en Prago

esprimiĝis pere de la germana lingvo (eble ankaŭ en jidiŝ: kiam en Prago gastis juda teatra grupo el Pollando). La menciita praga medio por Franz kaj liaj amikoj sufiĉis, pri la ĉeĥa elemento („ĉeĥeco“) ili ne interesiĝis, ili restis indiferentaj... Direndas, ke ankaŭ la lokoj ekster Prago, kiujn Kafka travojaĝis (ĉu tiujn industriajn, ĉu tiujn por saniĝi) estis germanaj (eĉ judaj). Kvankam iliaj nomoj sonas ĉeĥe!!

Nun ek al la „pilgrimado“, ke ne preteriru nin „avidaj turistoj“ celantaj al la Kafka-memorlokoj.

PRAGAJ

Náměstí Franze Kafky, n-ro 24 – Kie je la 3-a de julio 1883 naskiĝis „gracila, sed sana infano...“ Gracila (svelta) li restis la tutan vivon... sana – ne...

Dům u minuty, Staroměstské náměstí, n-ro 2 – De kie eliris la juna knabo, je la 1-a de septembro 1889, en sia unua lernejtago al lernejo, kiu troviĝis en la strato Masná. Kia antaŭdestino – kiel li tenis la manon de hejmkuiristino, kiu lin akompanis – kaj sentis grandan angoron. Kiu restis en li kiel dominantanta senco la tutan vivon!

Ni ne povas ne mencii la dominanton sur Staroměstské náměstí:

Palác Kinských (la palaco de la nobel-gento Kinský) – Estis en ĝi galanteria komerc-grandvendejo de lia patro Herrman K., kaj la germana gimnazio, kiun Franz vizitadis.

Ovocný trh, n-ro 3 – Tie troviĝis la Karlo-Ferdinando-Univerzitato (nun KARLO-U.), kie Franz ricevis la gradon de jurist-doktoro, en 1906.

Asekurejo GENERALLI, („Assicurazioni Generali“ Italia), Václavské náměstí, n-ro 19 – En kiu la laboro prenis multe da taghoroj, kiujn Kafka bezonis por sia „hobio“, tial li ŝanĝis la okupon kaj fariĝis jurista kontroloro, en simila instituto: Dělnická úrazová pojišťovna pro Království české (*Laborista asekurejo por la Ĉeĥa reĝlando*). Tiu troviĝis **Na Poříčí, n-ro 9**.

En nordaj regionoj de nia lando tiam disvolviĝis multfaka industria progreso. Kreskis tie multaj fabrikoj, en kiuj okazadis multaj labor-akcidentoj, ĉar oni ne respektis (eĉ eble ne havis) la regulojn por prizorgi higienon kaj okup-danĝeron. Kafka do fariĝas kaj instruisto por la reguloj, kaj kontrolisto de ili. Sed li ne estas nur „rigora oficisto“ – lin kaptas eĉ tekniko kaj teknologio, li mem proponas kelkajn plibonigaĵojn.

Antaŭ ol ekvojaĝi al la menciitaj lokoj, ni haltu en la loko plej fama:

Zlatá ulička, n-ro 22, sur Hradčany (Praga burgo).

La ĉambreton en unu dometo luis por si lia fratino Ottla, kaj ŝi ebligis al Franz post laboro esti tie kaj verki. „Mi restas tie plej ofte ĝis noktomezo. Poste la iro hejmen. El la dometo rekten sur la neĝon de la silenta strato...“

EKSTERPRAGAJ

Vratislavice: fama tapiŝo-fabriko de Ignaz Ginzkey – la tapiŝoj de tie vojaĝis eĉ en Metropolitanan operdomon en New York.

Jablonec nad Nisou: tie li havis instrukt-lecionojn por entreprenistoj kiel eviti akcidentojn en siaj fabrikoj kaj laborejoj, kaj same li instruis principojn pri asekurado de laboristoj.

Frýdlant: Lia fratino Ottla vizitis tie agrokulturan lernejon, por ke ŝi fake mastrumu la familian farmon en Siřem (post kiam la virposedanto, parenco, devis militservi).

Siřem: Tien, al la fratino, Franz ekvojaĝis en la espero, ke la kamparana aero kaj medio helpas eviti la tuberkulozon, kiu ĝuste estis malkovrita. Li restis tie 8 monatojn (1917–1918), kaj estis tio la tempo verkodona: tie li skribis la (malbon)faman 100-paĝan „DOPIS OTCI“ (*Letero al la patro*), (La patro ĝin neniam legis). Kaj tie-ĉi li ekkomencis skribi sian faman verkon „ZAMEK“ (*La kastelo*).

Ĉi tie ankaŭ okazis la neforigebla disiĝo de Franz kaj lia fianĉino Felice, kiu faris 30-horan vojaĝon el Berlin... Li devis fari al ŝi grandan kordoloron kaj malhonorigon. Laŭŝajne la kialo estis lia grava malsano, li ne volis esti malrespondeculo por alia persono... (Kiel montriĝas el lia biografio, tio estis vere nur „laŭŝajno“).

Dialogo en 28-a de septembro 1917:

Franz: Do, ĝis tie mi troviĝis.

Felice: Do, ĝis tie mi troviĝas.

Franz: Ĝis tie mi igis vin troviĝi.

Felice: Tio estas vero...

Turnov: Rande de la urbo estas granda hortikultura paradizo. La ĝardenoj de Mašek estas konataj eĉ malantaŭ la limoj de Eŭropo. La firmao liveris la kreskaĵojn kaj vegetan materialon en Egiptujon, Persion kaj Aŭstralion. Estas ĉi tie multo da varmigitaj forcejoj, dekmiloj da diversaj palmo-arboj kaj orĥideoj. Kafka tien alvenis en la septembro 1918. Denove li serĉas loĝejon laŭ du kriterioj: kvieta loko kaj eminenta manĝaĵo: kompreneble senvianda. Bedaŭrinde, li ne sukcesis. „Avantaĝo de hotelo: perfekta mastrumado, granda pureco, videble eminenta manĝaĵo. Malakceptaĵoj: nurnure vianda manĝaĵo (kvankam plenkvalita), kaj ovoĵoj. Io alia – nur rare kaj escepte. La vegetaĵon ricevi – tute ne eblas... Tamen unu bonaĵo: famaj turnovaj pomoj kaj piroj.“ (el letero al la amiko Max Brod).

Promeni en tiu ĉi „paradizo“ estis por Kafka vera ĝuo. Ni scias, ke en siaj junaj jaroj li volis esti ĝi hortikulturisto profesia; li veturadis en la Botanikan ĝardenon en Praha-Troja, kie li frekventis la hortikulturan kurson.

PORSANIGAJ VOJAĜOJ

Ni substreku, ke la menciitaj lokoj estis jam en si mem paŝoj kaj streboj por plibonigi la sanstaton. Ĝis tiam ne havis Kafka problemojn, li eĉ ŝatis certan sportadon (ekz. naĝadon). En sia okupejo li ricevis rajton por la bezona malĉeesto.

La speciala loko por resanigado estis la penziono Stüdl en la ĉeĥa **komunumo Želízy**.

(Citaĵo el antaŭe menciita libro S Kafkou na cestách:

„Preskaŭ fino de la jaro, malfrua novembro kaj ĉio estas ia malgranda finkalkulado... Kafka sentas sin certa, ĉar li estas malproksime de ĉio, kio koncernas Pragon; li daŭrigas sian longegan lamenton Dopis otci (Letero al la patro) – La multpaĝan verkon (fontoj: 100-paĝa), en kiu li esprimas sian koncernon al la patro, li neniam forsendis, la patro ĝin ne legis (nur la patrino – post la morto de F. K. ... M.T.).

Kiam li ne skribas, li babiladas kun la juna judino Julie Wohryzková, kun kiu li tuj fianĉiĝas.“ Kaj denove li ekkomplikas sian vivon...

INTERMEZO PRI LA AMO

Ni ne povas jenan temon eviti, se ni volas almenaŭ iom kompreni la „malkompreneblan“ Kafka-n. Jen Kafka – la „asketa tipo“, al kiu 1) preteriris amo? Aŭ – kiu li, memvole, 2) lasis la amon preterpasi?

Vera estas la punkto 2! Kun kelka surprizo ni legas, ke ĉe siaj vojaĝoj (kun Max kaj Otto Brod), ili vizitis la domojn por tiaj kialoj destinitaj, Kaj ke ankaŭ en sanatorioj travivis Kafka erotikajn aventurojn. Ne – Impotenta li ne estis. Pri tio ja prizorgis jam en la juneco lia patro Herrmann, kiu lin en la publikan domon alĝvidis.

Surprize estas, kiomfoje kaj kiel facile Kafka enamiĝis... Kaj kiel malfacile li de tiu „ŝarĝo“ sin liberigis... Da tiaj am-kontaktoj li havis pli multe, ol iu „normala viro“, kiu amas nur unufoje en la vivo. Kiu antagonismo en li mem malebligis (substrekendas, ke pli frue, ol li eksciis pri sia malsano) la ordinaran homan travivaĵon??... Li konsciiĝis, ke li ne estas taŭga por la familia vivo; ke li ne estas respondece forta samtempe plenumi postulojn de anima kaj korpa amkontaktojn de la amata virino (aŭ pli trafe amanta virino?): Tial ĉiuj liaj am-amikinoj devis travivi la amaran senton de malfeliĉo kaj malhonorigo, kiun al ili kaŭzis la karulo. La kunvivo intelektuala eble?? estus ebla. Sed la korpa, fizika amo estis al li „naŭza“ kaj „malpura“...

Komprenu, kiu kapablas...!

Špindlerůn Mlýn – Bedřichov n-ro 23

La jaro 1922. En jena montara, alneĝigita loko Kafka esperas kaj deziras plibonigi sian sanstaton. Tie li daŭrigas verki sian romanon Zámek, kaj finfine trovas la taŭgan nomon por la protagonisto.

Li mem: „Sur la tablo de hotelgastoj troviĝas dufoje mia nomo (kiun mi evidentigis ĝuste) en jena formo: **JOSEF K.**“ Ĉu providenco??

En la absurda kaj malkomprenebla anima, korpa stato finiĝis la angorplena vivo de nia martiro. Tio okazis je la 3a de junio 1924, do li apartenas al 100-jariĝaj jubilantoj de la jaro 2024.

Ke per la jena rememoro ne finiĝu nia intereso pri nia „samurbano“ kaj „kuncivitano“. Al la juda tombejo en Strašnice ne estas longa vojo...



Franz Kafka

Maria Terezia-ordeno

Josef Svatopluk Machar

Je la kvina matene ekmarŝis pafista bataliono el la dormanta Příbram. La suno dispelis kelke da ruĝaj nubetoj kaj komencis iel gaje bruli, same kiel hieraŭ, kiel antaŭhieraŭ.

Kapitano Kriehuber rajdis antaŭ la bataliono kaj tusadis sian matenan tuson. „Mil diabloj“, li murmuris kvazaŭ por si mem, sed tamen tiom laŭte, ke la leŭtenanto marŝanta frunte de la unua kompanio povu aŭdi tion, „ĝuste hodiaŭ transdonas la estraro la komandon al mi. Kompreneble, kiam alvenos la princa moŝto, marŝalo Albrecht, kaj la artileria generalo Beck, tiuokaze Kriehuber taŭgas! Tirolo antaŭen! Hodiaŭ ni ŝvitegos, filozofo, ĉu ne?“, li alparolis nun senpere la leŭtenanton.

La filozofo ekridetis devige.

„La estraro estas hodiaŭ inter la arbitracioj. Li certe ŝatos aŭdigi sin antaŭ la princa moŝto kaj antaŭ la ĉefstabestro, ĉu ne? Kaj al mi, kompreneble, denove li donis la plej malfacilan taskon: la batalionkomandon. En tiom grava momento...!“

„Sinjoro subkolonelo konas siajn homojn“, intermetis la filozofo, kiel li faris ĉiutage. Li konis sian kapitanon. Kriehuber sidis hieraŭ kune kun la adjutanto de la generalo en la gastejo ĝis la malfrua nokto, rakontigis al si detalege, „kio“ do morgaŭ okazos kaj kia estos la tasko de la bataliono. Li esplordemandis la adjutanton, kiamaniere tio estos farebla, trarigardis la mapon kun li, tion ĉion sciis la leŭtenanto kaj sciis ankaŭ, kion la kapitano volas atingi per ĉi tiu lamento: montri, kiel grava persono li estas, kaj ricevi aprobon almenaŭ de subalterna leŭtenanto. Kaj la filozofo ĉiutage donis ĝin al li, ĉar Kriehuber ĉiutage rememorigadis sian respondecon gravecon.

La suno brilis. La soldatoj gaje interparoladis. Blua nubo de tabaka fumo flugpendis super la longa vico de la bataliono kaj kuniĝadis kun la suprenturniĝanta strata polvo.

La leŭtenanto pensis pri siaj amatinoj kaj pri siaj versoj, ĉar li estis poeto. Kaj pro tio, ke hazarde li sciis kelkajn kronologiajn datojn el la historio kaj iom pri la Napoleonaj militoj, liaj kamaradoj nomis lin „filozofo“. Al ili ŝajnis almenaŭ, ke tiu nocio postulas tiajn sciojn.

La suno brulis.

Sur iu disvojiĝo staris du rajduloj. Subkolonelo, la batalionkomandanto, kiu hodiaŭ estis inter la arbitracioj, kaj la kavaleria brigadestro, maljuna, kromordinare dika generalo kun vizaĝo rememoriganta bonkoran gufon. La bataliono haltis. La subkolonelo alvokis „la sinjorojn“. Li parolis pri la princa moŝto la marŝalo, pri la ĉefstabestro, pri la honoro de

la pafista bataliono, pri „la plibraviĝo“ kaj tiel plu. Poste li ordonis, ke kapitano Kriehuber tralegu la hodiaŭan problemon kaj distribuu la taskojn. Kriehuber disŝiris la koverton, solene elprenis duonfolion de plenlitografita papero kaj legis, ke oni supozas, ke malamika divizio estis okupinta Příbram-on kaj sendas nun sian brigadon kontraŭ nin marŝantajn kontraŭ ĝin. Ke nia pafista bataliono staras maldekstraflanke, ke ĉi tiun flankon defendas la unua kompanio komandata de leŭtenanto Machan, kiu devas peni, okupi iun rokon, kiu laŭ la strategia vidpunkto estras la tutan regionon (leŭtenanto Machan, la filozofo, substrekis ion en la mapo) cetere li, kapitano Kriehuber, konkludante laŭ la tereno, konjektas, ke la malamiko intencos venkobati la mezon aŭ la dekstran flankon, kaj ke do la bataliono verŝajne ne venos en la fajron. Ĉi tiu klarigo estas nur privata, la oficialajn raportojn oni aŭdos post duonhoro en la brigadkunvenejo el la buŝo de la sinjoro generalo.

Machan revenis al la kompanio:

„Knaboj, ĉu vi vidas tiun maljunan generalon? Li estas kavaleriano. Dum vi marŝos preter li, montru, kiel scias marŝi la pafistoj: akran tempomezuron, per la piedoj nur ektuŝi la teron!“

La bataliono ekmarŝis. La soldatoj hakis per la kruroj laŭ ĉiuj siaj povoj, ke la bonkora gufo ekbalanciĝis sur la selo kaj diris laŭte al la subkolonelo:

„Vi, Schmied, viaj pafistoj marŝas, ke estas plezure rigardi ilin! Domaĝe, ke ili ne servas ĉe la kavalerio!“

Kriehuber kvazaŭ freneze ekgalopigis la ĉevalon. Atinginte Machan-on li diris: „Nu, filozofo, ĉu vi aŭdis, kiel prijuĝis nin la generalo? Kaj ĉu vi vidis, kiel egoiste la estraĉo akceptis tiun komplimenton? Nu, tiel okazas: ni penege laboras kaj la estraĉo rikoltas la aprobojn. . .“

Sur la brigadkunvenejo estis jam vigle. Du infanteriaj regimentoj estis tie, kelkaj kantunistaj veturiloj kun la provizo da kolbasetoj, pano, biero, brando kaj cigaroj. Virinaĉoj kun dorskorboj iradis inter la militistaro kaj vendadis iajn dolĉajn sukojn. Kurbopiedaj bakistoj trenadis de grupo al grupo siajn grandajn korbojn da freŝa bakaĵo (ankoraŭ varma). Bruado, ridado, pipa kaj cigara fumoj, svarmado de malhelbluaj figuroj, inter kiujn miksiĝis nun la grizaj uniformoj de la pafistoj.

La sinjoroj estis grupigitaj ĉirkaŭ la generalo, maldika nervema patrono, kiun lia tuta brigado nomis la konfuzulo. „Malamiko en la forto de unu divizio estis okupinta Příbram-on kaj elsendis unu brigadon kaj tiel plu“, eksplikis la generalo per raŭka voĉo, dishakante ĉiun vorton en du aŭ tri partojn, kaj finis atentigante pri la ĉeesto de la princa moŝto, marŝalo arkiduko Albrecht, same kiel de la ĉefstabestro barono Beck.

Eksonis korneto. Oni estingis la pipojn, forĵetis la cigaredojn, la soldatoj ekprenis siajn pafilojn kaj vicordigis sin. La brigado ekmarŝis al siaj pozicioj.

Sur terbulegoj de plugitaj kampoj marŝis leŭtenanto Machan kaj post li lia kompanio al la menciita roko.

„Knaboj, estu bravaj, tie vi kuŝiĝos kaj ripozos. Hodiaŭ ne necesos, ke vi purigu la pafilojn, ĉar vi ne bezonos eĉ unu kartoĉon.“

La knaboj marŝis brave, ili atingis la rokon, kuŝigis sin en maldensan herbon, elpoŝigis la pipojn kaj ekbruligis la restaĵojn de la cigaredoj.

La suno brulis kvazaŭ infere. Kaj nenie eĉ arbusto; la tero varmegiĝis sub la korpo kvazaŭ kamena plato.

„Bela pozicio,“ murmuris Machan, „post unu horo ni rostiĝos ĉi tie kvazaŭ duonangla bifstekoj“.

„Sinjoro leŭtenanto, tie antaŭ ni – eble dek minutojn da marŝo – estas arbaro“, raportis la trumpetisto, sur kies tuta vizaĝo ruliĝis ŝvito. Li estis konate la plej malsaĝa knabaĉo de la tuta kompanio.

„Haltigu la buŝegon!“, rebatis Machan.

„Estas tie arbareto, bela arbareto“, aldonis alia soldato.

„Diable! Tie estas versimile malvarmeto!“ opiniis alia. „Kaj ĉu la sinjoro kapitano ne havas tion en la mapo, ke tie estas arbaro?“, demandis iu naive.

„Azeno! En tiaj mapoj ne povas esti ĉio; via bieno ankaŭ ne estas tie“.

„Li havas bienon en Neniĥavejo“.

„Ho ne, en Ŝatushavejo“.

La filozofa Machan aŭskultis seninterese la incitaĵojn. Suferante pro la varmego li rigardis al la arbareto. Bela arbareto, kvadrato da maljunaj arboj, pli dikaj ol homa korpo. Kaj la herbo, kia herbo! Ĝi brilis eĉ ĝis ĉi tien. Cetere Kriehuber certe informis sin bone hieraŭ ĉe la adjutanto, ke ĉio okazos en la mezo, ja eble ĉe la tute kontraŭa flanko.

„Ek!“, li ordonis kaj per kuraĝaj paŝoj oni ekmarŝis malsupren de sur la roko kaj celis la arbareton.

„Ho, kia malvarmeto!... Ĉiela malvarmeto!...“

„Knaboj, malantaŭ la arbojn! Ĉiu estu kaŝita!“

La soldatoj kaŝis sin, la afero plaĉis al ili, sed ne tro longe.

Ĉevalgalopo.

„Sinjoro leŭtenanto Machan! Sinjoro leŭtenanto“ kriegis malantaŭe kapitano Kriehuber, „kien vi grimpis do, ho vi malfeliĉulo! Ĉu vi ne aŭdis? Mi arestigos vin, mi arestigos vin, al raporto mi destino vin!“ kaj Kriehuber estis ruĝa kvazaŭ kankro.

Samtempe eksonis el la kontraŭa direkto ekpafoj de la malamiko.

„Diablo prenu vin! Formanĝu mem, kion vi pretigis! Mi ne ŝirmos vin!“

Li insultis ankoraŭ ion kaj forgalopis.

„Fajron!“, komandis Machan.

La kompanio ekpafis salvon. Kaj kiam la pafado eksonis, la soldatoj preskaŭ ektimigis. La pafado estis grandega, nekutima kaj resonis kelkajn fojojn. La arbokronoj ekvibris kaj bruis kvazaŭ volante esprimi sian kontentecon.

La roko malantaŭe, kiu estis destinita por la grupiĝo de la kompanio, resonigis la salvon tri- aŭ kvaroble.

„Fajron!“ komandis denove la filozofo.

Kaj la dua pafado eksonis terure kaj estis ripetata per la eĥoj.

„Atentu! Pafadu malrapide unu post la alia!“

Infera bruego; ĉe Hradec Králové en la plej penega batalo certe ne estis pli granda bruego.

La malamiko, evidente konsternita, retiriĝis. Sed ne longtempe. La ĉenoj de ĝiaj vicoj plifortiĝis, plidensiĝis kaj ekmarŝis antaŭen.

Machan trankvile rigardis la paf-ekbrilojn, trembrilojn de la sabroj kaj laŭ la nombro de la oficiroj li taksadis la nombron de la malamiko. Baldaŭ staris kontraŭ li jam kelke da batalionoj. Sed la terura pafado de lia kompanio evidente maltrankviligis la malamikon. La ĉeno de la malamikaj vicoj plifortiĝadis, sed ili ne marŝis antaŭen.

Du rajdantoj enrajdis de malantaŭe la arbaron: arkiduko Albrecht kun sia adjutanto.

„Kiu komandas ĉi tie?“ demandis la marŝalo per sia alta, preskaŭ sibla voĉo.

„Princa moŝto, leŭtenanto Machan, de la sesa pafista bataliono, unua kompanio prezentas sin plej obeeme.“

„Bone, ne movu vin de ĉi tie, leŭtenanto!“

Ili forrajdis. La batalo tondris plue.

Novaj du rajdantoj: barono Beck kun sia adjutanto.

„Kiu komandas ĉi tie?“

Machan prezentis sin.

„Tenu ĉi tiun pozicion, sinjoro leŭtenanto, kaj postulu helpajn trupojn!“

Machan sendis la trumpetiston al Kriehuber. (La trumpetisto vojeraris kaj revenis nur vespere al Příbram.)

La batalo prospere disvolviĝadis. La eĥo laboris kvazaŭ freneze. La arbaro bruegis kaj tio estis agrabla emocio en ĝia malvarmeto. La malamiko vidalvide estis kreskinta ĝis teruraj amasegoj, sed ne marŝis antaŭen.

Kaj subite rimarkis Machan ion teruregan. Paniko kaj konfuzo tie vidalvide. Trumpetado, komandoj. La linioj leviĝis, returnis sin kaj pafadis ien.

„Ho! La niaj atakas la dorson de la malamiko“, konjektis Machan.

„Knaboj, la lastajn kartoĉojn en la pafilojn kaj pafadu, kiom nur eble!“

Dudek sputegantaj pafilegoj ne povus fari pli grandan bruegon. Subita trumpetado. La batalo finiĝis.

La arbareton engalopis Kriehuber senspira. Li saltis de sur la ĉevalo, ĉirkaŭbrakis Machanon: „Filozofo, filozofo!“ li elpuŝis el si kaj longtempe ne kapablis diri ion pluan. Poste li elpoŝigis cigaron. „Tio estas specialaĵo, prenu ĝin! Kaj ĉu vi scias, ke ni venkis, kaj ĉu vi scias, ke okaze de milito

ni ambaŭ havus jam certa la Maria Terezia-ordenon?! M-a-r-i-a-T-e-r-e-z-i-a-n!“

Machan rakontis al li pri la vizitoj de Albrecht kaj Beck.

„Vidu, kiel feliĉa vi estas! Malbenita knabo, vi faros karieron! Ni ambaŭ, filozofoj, ni ambaŭ! Maria Terezia estus certa al ni! Kia feliĉo, kia feliĉo! Verku poemon pri tio!“

Kaj li rakontis: „La malamiko koncentris siajn trupojn kontraŭ la arbareto, pri kiu li konjektis laŭ la pafado, ke ĝi estas eksterordinare forte okupita. La niaj repuŝis poste la malforigitan flankon, ili premis ankaŭ la malamikan mezon kaj ekatakis ĝin en la dorso.“

Dum la returna marŝo alrajdis Kriehuber la maldika generalo. Donante al li la manon li dankis lin eksterordinare kore kaj precipe tial, ĉar la princa moŝto kaj barono Beck persone ĉeestis ĉi tiun strategian majstraĵon, ke en serioza okazo tia ago rezultigas Maria Terezian.

Posttagmeze invitis Kriehuber sian leŭtenanton en vinvendejon. Li mendis paron da kolbasetoj kaj okonon da vino por li, pri kio miregis ĉiuj, kiuj konis la avarecon de Kriehuber. Kaj longe kaj larĝe li priskribis siajn disponojn por klarigi, ke propravole li devis agi kontraŭ la ricevita ordono, sciante, ke sole per tio li sekvigos neatenditan ŝanĝon de la tuta batalo, kaj kiel la marŝalo rajdis al li kaj diris: „Bone tiel!“ kaj kiel barono Beck diris al li: „Restu ĉi tie kaj plimultigu la taĉmenton en la arbareto!“

Kompreneble, ke ankaŭ lia leŭtenanto Machan estas bonega homo, kiu scias plenumi ordonojn. Ili ambaŭ havus la Maria Terezia-ordenon, se tio estus okazinta en milito.

Kaj poste vespere ebrigiĝis la bona Kriehuber ĝis muteco kaj dekfoje li rakontis sian historion kaj dekfoje li ĝemsopiregis efektivan militon, en kiu la „Maria Terezia“ certe ne estus lin maltrafinta.

1905

Tradukis M.E.P.



Miro

Marjorie Boulton

Tiom da steloj, tiom da verdoj!
Koloroj malsimilaj sur la tero!
Tiom da gajnoj, tiom da perdoj,
Personoj en ovuloj en utero!

Tiom da lingvoj, tiom da landoj,
Ĉiu kun propra vivomaniero!
Tiom da petoj kaj demandoj,
Tiom da bestoj sur la tero!

Mi miras pri la tero, tiel riĉa,
La sunleviĝo, tago kaj vespero,
La vivdonac' varia, senkondiĉa,
Tiom da mensoj sur la plena tero!

Ĉiumatene ĉio estas nova,
Fenestro, lito, urbo kaj pasero,
Korpo malforta kaj la suno pova,
kaj ĉiu kanto de la brua tero!

Saltanta kato, ankaŭ la testudo,
Tineo kaj sciuro, rinocero,
Malsimilegas en la glora ludo,
Infanoj de la naskiĝanta tero!

Tiom da ludoj, tiom da miroj,
Kaj ĉiujare venas la somero!
Malsimileco, pensoj kaj deziroj -
La glora tiomeco de la tero!

1953

Termíny schůzek od listopadu:

7. 11. / 21. 11. // 5. 12. / 19. 12.

Klub esperantistů v Praze,

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00
Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>
E-mail: paha@esperanto.cz
Facebook: <https://www.facebook.com/esperantoprago>
YouTube: Esperanto Prago
Schůzky: Revoluční 5, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00